

La perbilda instruado

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 487, 1981.06.11 & 13

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni komencis raporti pri la instruado de esperanto en baza lernejo de la urbo La Chaux-de-Fonds. Tiu ĉi naŭa eksperimento pri la instruado de esperanto al naŭ-kaj dek-jaraj infanoj havas metodikan celon: pliprofundiĝi en la perbilda instruado de esperanto. Ni diris, ke ekde la unua leciono forestas ĉia krokodilado. Tio signifas, ke eĉ al tradukrimedoj oni rezignas. Per gestoj kaj per la utiligo de taŭgaj bildoj, kiujn la infanoj povas manipuli, estas enkondukita la fundamenta vortaro. Legado de tekstoj en esperanto nur postvenas, kiam la geknaboj estas asimilintaj la necesan vortaron kaj frazaron.

A.- Hodiaŭ ni donu enkondukajn klarigojn pri tio, kion ni nomas la perbilda instruado.

Cl.- Ekzistas multaj eblecoj utiligi bildojn por la instruado de la baza vortaro. Ni listigu ilin:

A.- Simplaj desegnoj en lernolibroj jam donas la eblon instrui multajn vortojn sen la perado de la tradukado en nacia lingvo.

Cl.- Ekzistas bild-tabuloj pri precizaj temoj, kie ĉiu desegnitaĵo estas numerigita. Ili faciligas la asimiladon de sufiĉe vasta vortaro kaj poste la kontrolon de la konoj de la gelernantoj.

A.- Bildkartoj eldonitaj por ludigi infanetojn estas tre utilaj. Ilia avantaĝo super la ĵus menciitaj ilustraĵoj estas, ke la gelernantoj povas ilin manipuli. Oni povas organizi per ili plej diversajn lingvajn ludojn. Unue tiuj ludoj havas la celon asimiligi la koncernan vortaron; poste utiligi tiujn ĉi vortojn en frazoj. Pro la riĉeco de tiuj ĉi lingvaj ludoj, ni revenos al tiuj ĉi bildkartoj.

Cl.- Sed unue ni menciuj alian materialon. Svisa firmao eldonas bildojn, kiujn oni povas fiksi sur flanel-panelojn. Ili rilatas al plej diversaj temoj, estas tre variaj kaj plaĉaj. La manipulado de tiu ĉi bild-materialo montriĝis ege fruktodona por rapide paroligi ne nur infanojn, sed ankaŭ plenkreskulojn. Kiel per la ĵus antaŭe menciitaj bildkartoj, oni povas unue instrui bazan vortaron. Kaj poste oni povas proponi ludojn, kiuj paroligas la kursanojn, helpante ilin formi pli kaj pli kompleksajn frazojn. Antaŭ ol doni pli precizajn sciigojn pri tiuj ĉi manipuladoj paroligaj, ni ankoraŭ prezentu alian materialon.

A.- Temas pri mutaj bildstrioj. Oni povas utiligi ilin plurmaniere, ĝenerale kiam la gelernantoj kapablas ekparoli en esperanto. Unue pere de ili oni povas rakonti la humuraĵon kaj poste rakontigi ĝin. Se oni disigas la bildojn, oni povas rakontigi kio okazis antaŭ la koncerna bildo kaj kio okazos poste. Oni povas ankaŭ divenigi la finon de la rakonto. Ĉio tio alportas multe da bonhumoro, babiligante eĉ la plej silentemajn gelernantojn. Fine oni povas organizi ludojn. Oni miksas plurajn rakontojn, kaj per demandoj la gelernantoj provas akiri la kartojn, kiuj formas unu bildstrion. La unua, kiu povas formi kompletan bildstrion ĝin rakontas kaj venkas en la ludo.

Cl.- Kiam oni praktikas la perbildan instruadon de esperanto, en kiu forestas ĉia traduka interveno, do ĉia emo al krokodilado, oni troviĝas en tre reala situacio, kiu rememorigas tiun, kiu karakterizis la asimiladon de la gepatra lingvo. La infanoj ne plu troviĝas antaŭ rigida

instrumaterialo. Antaŭ ili troviĝas ludmaterialo, kaj ĝin manipulante ili lertiĝas en la praktiko de la nova lingvo. Estas aventuro entuziasmiga.

A.- Fine la lumbildoj estas kvazaŭ deserto. Ili povas esti utiligataj por aŭdigi rakontojn aŭ por paroligi la rigardantojn per plej diversaj rimedoj: demandoj kaj respondoj; frazkonkursoj; vortĉasado; fraztransformoj, ktp.

Cl.- Per tiuj kelkaj ekzemploj ni verŝajne komprenigis al vi, kiom abundaj estas la rimedoj por perbilde instrui esperanton. Ni nun revenu al la bildoj fikseblaj sur flanel-panelon, kiuj montriĝis la plej fruktodonaj, por paroligi la infanojn kaj la plenkreskulojn.

A.- Tiuj bildoj rilatas al la ĉisekvaj temoj: cirko, arbaro, kamparana vivo kaj cirkulado. Miksante bildojn el diversaj temoj, oni povas senlime krei novajn paroligajn situaciojn.

Cl.- Komence de la perbilda instruado, el tiu ege riĉa bildaro, oni elektu tridekon da bildoj, kiuj proponu nomojn de bestoj:

A.- ekzemple elefanto, hundo, kato, leono, bovino, ĉevalo, vulpo, kuniklo, serpento.

C1.- De kelkaj bestoj oni havu la viron, la inon kaj la idon:

A.- ekzemple cervo, cervino, cervido.

Cl.- Aliaj bildoj reprezentu homojn:

A.- Estu knabo, knabino, bebo, sinjoro, sinjorino, klaŭno, dika maljunulino, kamparano, dancistino, sorĉisto kiu kraĉas fajron, domptisto, ĝendarmo, ktp.

Cl.- Fine bildoj de objektoj donas la eblon vivi la bestojn kaj homojn en precizaj situacioj.

A.- Estu domo kun fermitaj fenestroj kaj domo kun malfermitaj fenestroj, estu benko, fontano, arbo, traktoro, ŝarĝaŭtomobilo, biciklo, korbo, nesto kun ovoj, rul-domo, vojmontrilo, fajro, segilo, trancilo, ktp.

C1.- Jen kiel komenciĝas la instruado en la unua leciono. Oni povas imagi plurajn situaciojn: la infanoj formas grandan rondon, kaj la bildoj kuŝas meze de la cirklo sur la planko. Se estas plenkreskuloj la bildoj kuŝu meze de ili sur vasta tablo. Aŭ la bildoj estu jam fiksitaj sur la flaneltabulo. Estas egale. Grave estas, ke la tuta bildaro troviĝu je dispono.

A.- La instruanto prenas unu bildon. Li samtempe diras mi prenas bildon. Li aldonas: ankaŭ prenu bildon! kaj per gestoj, li komprenigas al la gelernantoj, ke ili prenu bildon. Fine ĉiuj komprenas kaj havas bildon.

Cl.- La instruanto montras sian bildon dirante: mi montras bildon. Kaj li invitas la gelernantojn ankaŭ montri sian bildon kaj diri: mi montras bildon.

A.- Kaj povas komenciĝi la unua ludo. La instruanto diras, montrante sian bildon: tio estas klaŭno! ripetu: tio estas klaŭno! La infanoj ripetos. Li poste montras la bildon de lernanto kaj diras: tio estas knabo! ripetu: La infanoj ripetos, Kaj oni provas rediri la nomojn de la bildoj: tio estas klaŭno, tio estas knabo, kaj ĉiufoje aldoniĝas la nomo de nova bildo. Unue korse ĉiuj provas diri tiujn ĉi nomojn, poste organiziĝas specoj de konkursoj: kiu povos diri plej

multe da vortoj. Fine oni metas la bildojn sur la tablon aŭ sur la plankon, kaj la konkursantoj sin servas dirante ĉiujfoje kion ili prenas: tio estas leono, tio estas serpento, tio estas kamiono, tio estas fontano. Fine de tiu ĉi unua leciono jam tre riĉa vortprovizo estas asimilita en modela frazstrukturo

Cl.- En posta leciono la samajn bildojn oni utiligos por instrui novajn frazojn. Ekzemple: mi prenas knabon, mi prenas elefanton, mi prenas domon, ktp. Aŭ mi havas fontanon, mi havas sinjorinon, mi havas bebon.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond raportis pri la perbilda instruado de esperanto. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*